

# STARTO

**N-ro 2/2005 (215)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**Nova retejo de Lančov <http://www.set-lancov.cz/>**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

**rete Starto:** malovec@volny.cz,

**rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokategorioj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

GRAVA INFORMO!!!

**NOVA BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

Poŝtovní spořitelna Poděbrady

ISSN 1212-009X

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz, libuse.dvorakova@khspee.cz (kluby)

**Komitatano:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942; Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec.starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Gazetara-informa komisiono:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

**Redakto-fermoj:** 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

## 45 jaroj de Esperanto- rondeto en Česká Třebová

Vendrede la 8-an de aprilo 2005 kunvenis esperantistoj por festi 45 jarojn de Esperanto-rondeto AMIKECO en Česká Třebová. Al la klubejo de SONS (blindula asocio) venis ne nur membroj, sed ankaŭ gastoj el najbaraj E-rondetoj kaj ĈEA-reprezentantino inĝ. L. Dvořáková.



La ĉeestantojn bonvenigis la prezidantino Z. Novotná. Post komuna kantado laŭ akordeono ili aŭdis prelegon pri la historio de la rondeto, kiun preparis unu el la fondintoj, Jiří Pištora, laŭ tri kronikoj, kiuj ekde 1960 dokumentas per vortoj, bildoj kaj fotoj la riĉan agadon de AMIKECO.

Ŝajnas preskaŭ nekredeble, ke la tradicio de Esperanto-baloj kaj Silvestrotagoj estas konata inter esperantistoj malproksime post la ŝtatlimoj kaj multaj eksterlandanoj ilin rememoras. La lasta balo estis jam la 36-a, ekde la 8-a ili estis sen fumantoj. Dum la 10-a, 15-a kaj 20-a datrevenoj de la balo realiĝis eĉ du baloj en unu jaro. Partoprenis ilin loĝantoj de la urbo kaj ankaŭ espe-

rantistoj el Aŭstrio, Germanio, Hungario, Italio, Nederlando kaj Pollando. Pri la propagando de la urbo meritis esperantlingva broŝuro pri la historio kaj nuntempo de la urbo, kiu estis disdonata al eksterlandaj amikoj. La kronikoj atestas, ke la rondeton vizitis amikoj el 23 ŝtatoj, la klubanoj mem vizitis 22 ŝtatojn. Sed ne ĉiujn reciprokajn vizitojn registras la kronikoj. Baldaŭ post estiĝo la rondeto komencis korespondi, eĉ kun 34 ŝtatoj, kaj prezenti sian agadon al la publiko per ekspozicioj (sume 7). La 22-an de julio 1991 estis malfermita kafejo Esperanto en la teretaĝo de la nuna Kulturcentro kun ĉeesto de niaj rondetanoj, kiuj preparis ankaŭ la esperantlingvan manĝokarton. Bedaŭrinde restis nur la nomo de la kafejo, esperantlingvan menuon vi ne vidos.

Baldaŭ post estiĝo de AMIKECO komencis la membroj kunlabori kun kluboj en la najbaraj urboj Svitavy, Lanškroun, Žamberk, Litomyšl kaj Polička. En dumonataj intervaloj preparis ĉiu klubo programon por la ceteraj. Partoj de la programo estis dediĉitaj al ekzercado de Esperanto, al informoj pri la agado de la kluboj, al amika konversacio kaj al klerigado. Estas preskaŭ nekredeble, kion ĉion sukcesis la esperantistoj ekoni. La kompleta listo estus tro longa, ni menciuj nur la plej gravajn: tabakfabriko, vinkelo, bierfarejo, kontrolturo, truta kovejo, Keralit, Svojanov, Litice, naskiĝdomo de Diviš, Landpordego, puntomuzeo, fazanbredejo, buĉejo, fiŝejo, muzeo de kuriozaĵoj, librobindejo, entrepreno "ĉio por fajrobrigado", minigalerio, vizito ĉe aproj, malnova muelejo, vulpofarmo, diversaj muzeoj ....



La rondeto tenas partnerajn rilatojn kun Esperanto-klubo en Schwerin en Germanio kaj multaj niaj esperantistoj tie travivis semajnon de amikeco.



Nian rondeton vizitis male tieaj esperantistoj kaj pluraj raraj gastoj, kiel František Pytloun, eminenta esperantisto, Theodor Kilian, aŭtoro de E-lernolibroj, Jiří Karen, E-poeto, Zuzana Švabinská, duonfilino de Max Švabinský, De Jong kaj Joachim Giesner, prezidantoj de IFEF (fervojistoj).

En 1992 transiris al Urba Muzeo en Česká Třebová la Biblioteko de Jaroslav Šustr el Prago kaj tiel estiĝis Esperanto-kolekto, kiun riĉigis pluaj donacoj.

Vi certe rekonos, ke ni rajtas soleni. Plie ni scias, ke en nia urbo estis esperantistoj jam pli frue, sed mankas skribaj dokumentoj. Nun esperantistinoj el Svitavy trovis en ilia kroniko interesan informon. Esperanto-aranĝojn en Svitavy 1934 partoprenis esperantistoj el Česká Třebová, en la jaroj 1935 la kroniko citas la nomojn Vaněk, Vopršál kaj Havlíček. En 1936 la kroniko mencias fondon de Esperanto-grupo en Česká Třebová. Do venontjare ni povus festi 70

jarojn. Kaj ni amas festadon. Vi certe ankaŭ, ĉu?



## Rimarkigo de la redaktoro:

**Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (BĈAE) 2/1936 mencias sur p. 13:**

*Česká Třebová.* Rondeto de amikoj de E. aranĝis la 11. X. paroladon pri la Univ. Kongreso en Romo kaj diskuton pri propag., kurso kaj fondo de EK aliĝonta al la nova tuŝtata centro. - 5. XI. malfermo de kurso.

**BĈAE 6/1936, p. 42:**

*Česká Třebová.* 8. X. laborkunveno de la loka societo de E-amikoj. Propagando kaj kurso preparataj.

**Ligilo, majo 1936, p. 38:**

*Svitavy-Zwittau.* La „Verdstela Frataro“ .... La 28.3. du niaj grupanoj ĉeestis kiel gastoj en E. kunveno en Ĉ. Třebová.

**BĈAE 2/1937, p. 6-7:**

En „Raporto pri agado de Esperanto-Asocio en ĈSR en 1936“ estas Ĉ. Třebová kaj Svitavy menciitaj inter lokoj, en kiuj okazis kursoj kaj kunvenoj, sed inter lokaj grupoj aliĝintaj al la Asocio ili mankas.

## Schůze výboru ČES

V sobotu 14. května se sešel ve Svitavách výbor Českého esperantského svazu na své 11. schůzi v tomto volebním období. Hlavním tématem jednání bylo zajištění stěhování LIBROSERVA a knihovny z Dobřichovic do nového sídla Svazu v Poděbradech, které se uskuteční v polovině června 2005. Výbor se rovněž zabýval pokračující přípravou organizace 11. sjezdu ve Vyškově v říjnu tohoto roku. Pozvánku s programem a přihlášku můžete najít v tomto čísle Starta. Následujícím diskutovaným bodem byla další existence Esperantského muzea v České Třebové a možnost zpřístupnění sbírek široké veřejnosti. Výbor ČES dále projednal iniciativu esperantistů ve vztahu k poslancům Evropského parlamentu a rozhodl se spojit ji s evropskou kampaní japonského mecenáše Etsuo Myosi. V části schůze věnované sekcím vyslechli přítomní zprávu o výroční schůzi Sekce nevidomých, která se uskutečnila letos v dubnu, a o obnovení organizace esperantské mládeže.

*Jiří Tomeček*

## Novaj libroj

**Arne, la ĉefido** (KAVA-PECH), aventuroj de vikinga knabo.

**Intimaj temoj en la Esperanta beletro** (KAVA-PECH) - kolekto de prelegoj en OSIEK 2003 (Ch. Declerc, G. Berveling, V. Kočvara, M. Malovec, E. Urbanová, M. Butan, J.-L. Tortel, E. de Zilah).

**Fake pri Esperanto kaj Esperante pri sciencoj** (KAVA-PECH) - kolekto de prelegoj KAEST 2004 (J. Werner, D. Blanke, H. Hoffmann, W. Blanke, M. Malovec, J. Hron, M. Bavant, M. Minich, R. Sachs, O. Haszpra, B. Leonov).

**Celostní medicína a Saamova akupunktura** (KAVA-PECH) - traduko el Esperanto en la ĉeĥan pri la klasika korea medicino.



**Legolibreto II.** (EK Mladá Boleslav kaj Mnichovo Hradiště) - dua volumo de legolibro, kompilita de J. Drahotová kaj M. Vaněk (lingva kontrolo Richard Moerbeek) alportas facilan legaĵon por komencantoj (Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, CZ-293 01 Mladá Boleslav, 50 Kč + 16 Kč afranko).

**Poŝli to dál III** (Chronos) - tria spirita mesaĝo de poetino Věra Ludíková, al kiu kontribuis famaj kaj malpli famaj personoj (ekz. Jan Kačer, Josef Fousek, Jan Vodňanský, geedzoj Berger, Jan Zákopčaník). El esperantistoj kontribuis Kokou Sagbadjelou, Gerrit Berveling, E. Urbanová, Č. Vidman, M. Malovec, J. Karen (sendis la vidvino).

**Verda duopo** (EK Brno) - kolekto de prelegoj omaĝe al Josef Vondroušek (1904-1995) kaj Vilibald Scheiber (1904-1974), kies 100-an datrevenon de la naskiĝo la klubo festis en decembro 2004. Prezo 50 Kč.

## Skokovy

Dum tre bela vetero pasis semajno en Ĉeĥa Paradizo – la XX-a lingva seminario de AEH – Asocio de Handikapitaj Esperantistoj. Ne ĉiuj povis ĝui tutan semajnon, sed entute 50 personoj partoprenis. Nia nederlanda gasto restis eĉ pli longe. Loka klubo petis lin prelegi pri lia lando al studentoj de „Universitato de la tria aĝo“ en Mladá Boleslav. Esperantistoj interpretis lian prelegon ĉe lia granda mapo de Nederlando.

Dum la seminario aperis kelkaj komencantoj kaj interesiĝantoj. Estraranoj de ĈEA, s-roj Chrdle kaj Pluhař, dediĉis al ni tempon kaj prezentis librojn kaj sciigis informojn.

Oni instruis en kvar grupoj antaŭtagmeze (J. Werner, M. Turková, L. Filipová kaj J. Drahotová). Frua posttagmezo apartenis al la printempa verda naturo. Oni povis unuan fojon trairi „Padon de Drahoř“, kiun post longa penado permesis lokaj institucioj realigi, sed nur por bezonoj de pensiono ESPERO. Geedzoj Stibůrek kaj s-ino Drahotová indikis la vojon per verdaj palisetoj, enbatitaj profunde en la teron. La vojeto gvidas paŝantojn laŭ rokaro, proksime de la pensiono en la arbaro.

Vesperaj prelegoj ĉiam vekis abundan diskuton kaj la vespero ne enhavis prelegon nur unu. Estas necese laŭdi prelegon de Majka Pichová pri

ŝia laboro kun ceramiko, demonstratan per montraĵoj de la labora procedo. Cetere ĉiuj prelegoj estis valoraj kaj informoj utilaj.

Václav Kaprál parolis pri planata ekspozicio en Plzeň okaze de la centjara jubileo de la klubo kaj pri akompana programo.

La venonta seminario okazos de la 7-a ĝis la 13-a de novembro 2005.

*J. Drahotová*

## SKOKOVY

### nia ESPERANTO-HEJMO

#### Hejmo - Domo

Kiu ne scius la vortojn de nia himno? Nia hejmo estas tie ĉi nia tuta lando, ĉiuj ĝiaj naturbeloj. Iam estas la hejmo kunigita kun nia naskiĝloko, kun nia gepatra lingvo. Mi ŝatas kanti kaj aŭskulti nian himnon, precipe kiam ĝi sonas sur olimpia aŭ iu alia monda stadiono.

Nia hejmo povas esti ankaŭ regiono aŭ loko de nia restado. La „hejmo“= „domov“ en la ĉeĥa, origine devenas de la vorto „domo“, tiu ĉi estas loko, kie ni loĝas. Por senti la hejmon – ofte sufiĉas al ni lito, tablo kaj seĝo („Kdo židli má – bydlí“). Sed precipe oni devas senti kvieton de familia kamento, sekurecon de familia interna lando. Tiu ĉi familia kohereco daŭras en nia vivo. La hejmo-ligilo estas tre forta kaj ĝi devigas nin averti ĉiam al tempo de nia juneco, eĉ se nur en niaj pensoj.

Ni povas havi ankaŭ la senton el nia dua hejmo. Tiun mi havis ĉiam dum miaj vizitoj en Slovakio. Tie ĉi mi sentis min kiel inter miaj plej proksimaj, ja ankaŭ la slovaka lingvo estas proksima al la nia. Iu translokiĝis eksterlanden, al kutimiĝis al la koncerna lando, ĝi estiĝis onia hejmo. Kaj kio estas hejmo? „Tio estas loko, kie ni povas pendigi nian ĉapelon“, diris Jiří Voskovec. La loko, kie ni povas sen iaj maltrankviliĝoj ripozi. La loko, kie nin edukas niaj gepatroj. Kaj ĉefe, kie estas nia patrino, kie ni povas vivi en la familia rondeto, kie ni havas niajn konatojn kaj amikojn, de kie ni startas ekkoni la mondon.

Kiam alvenas maljuneco kun siaj korpaj kaj psikaj difektoj kaj malsanoj, estas „konvena“ la hejmo por pensiuloj kun

### Próza je dobrá věc

ale nakonec  
 zkuste to s básničkou  
 třeba maličkou  
 Co tomu říkáš Roničku  
 Celou noc jsi štěkal  
 nějakou psí básničku  
 To tě tak měsíc rozštěkal?  
 Skokovy v květech žijí dál  
 A náhle slyšíš koní cval  
 Břízy tu šumí opodál  
 Jak rád se vracíš do tohoto kraje  
 u Českého Ráje  
 kde to všechno kolem zraje  
 rozkvétá a zpívá  
 Tady zní stále podmanivá  
 jedna řeč v téhle zeleni  
 a rozbíhá se do světa  
 po celých sedm jarních dní  
 Ať její naděje se naplní

Čestmír Vidman, Skokovy 16.4. 2005

senĉesa medicinista kuracado, flegado, servistina helpado, inkluzive manĝadon, ordigadon kaj riparadon. Ekzistas ankaŭ hejmoj por korpe difektitaj homoj – sendepende ĉu junaj, ĉu maljunaj. Ĝuste en tia *Hejmo por vidkapablo-difektitaj homoj* mi troviĝas. Ĝi plenumas funkcion de vera, natura hejmo, kun ĉia prizorgo – krom tiu de la familia rondeto.

Kaj ĝuste tiun **familian rondeton**, tiun **hejmecon** mi trovis inter esperantistoj en SKOKOVY.

Mia koro kaj animo abundis je agrablaj kaj dankemaj sentoj, kiujn mi dum-semajne notadis surpaperen. Nur la lastan nokton mi eksciis, kio kompletigas la senton de la hejmeco: hundo. Li atentigis min kompreni, ke:

### Prozo povas ja konveni

tamen estonte  
 kun poemo provu veni  
 al ni renkonte  
 Jen - impresis versa nuno  
 nokte hundon kiu bojis  
 pro poemo laŭte ĝojis  
 kiun verkis li por luno  
 Galope tuj ĉevaloj kuras  
 nefore arboj eksusuras  
 Skokovy floras – ĉu fortuno?  
 Apude lando promesita  
 nomita Ĉeĥa Paradizo  
 Ni iras tien por provizo  
 de bonhumor', por kanto sprita  
 Tia lingvo tre ekscita  
 ruliĝas kiel verda ondo  
 Ĝi disvastiĝas tra la mondo  
 pleniĝas per ĝi la semajno.  
 Kredu ni al ĝia gajno!

Esperantigis Jaroslav Krolupper

## Esperantská mládež

*Dobrý den,*

*jsme skupina tří mladých lidí, kteří se v současné době snaží obnovit aktivity ĈEJ - Ĉeĥa Esperanto-Junularo, mládežnické sekce ĈEA. V současné době se snažíme zkontaktovat co nejvíce mladých lidí z České republiky (obvyklá věková hranice je 30 let) a nabídnout jim možnost stát se členem ĈEJ, abychom mohli později spolu s nimi začít vyvíjet společné aktivity. Tímto dopisem se na Vás obracíme s prosbou, abyste předali níže uvedené sdělení informující o obnově ĈEJ všem členům naší organizace a všem svým přátelům, kterých by se mohlo týkat, či kteří by mohli zprostředkovat jeho předání takovýmto lidem. Vaši pomoc v této věci velmi uvítáme, přispějete tak k rozvoji aktivit mladých českých esperantistů. Jakékoliv Vaše dotazy či připomínky rádi přijmeme a zodpovíme na e-mailové adrese*

*[chrosticek@seznam.cz](mailto:chrosticek@seznam.cz).*

*S pozdravem za ĈEJ Marek Blahuš, Tomáš Břicháček a Dáša Chvátalová.*

Milí přátelé,

v letošním roce dochází k obnově ĈEJ - České esperantské mládeže. Zveme proto vás, mladé esperantisty, příznivce a třeba i jen zájemce o tento mezinárodní jazyk, do našeho kruhu. Snažíme se obnovit klub české esperantské mládeže, který by měl sdružovat všechny mladé české esperantisty a zájemce o esperanto, pořádat kurzy, organizovat vlastní setkání a společné cesty na zahraniční akce, sbírat informace o esperantu a jeho využití, pomáhat lidem využívat esperanto k dopisování, cestování, přátelství a dalším účelům.

Většina komunikace mezi členy klubu bude probíhat prostřednictvím internetových stránek a elektronické pošty, ale samozřejmě ani lidé bez přístupu k internetu nezůstanou stranou - mohou využít klasickou poštu.

Prozatímní WWW stránky si můžete prohlédnout na

[www.esperanto-cz.net](http://www.esperanto-cz.net).

Jsou zde zveřejňovány aktuality a zajímavosti ze světa esperantistů, kurzy a spousta dalších odkazů.

Nejdůležitější akcí tohoto roku bude IJK (Mezinárodní mládežnický kongres), který se koná začátkem srpna v Polsku (poblíž českých a slovenských hranic). Rádi by-



chom využili této příležitosti a zúčastnili se v co největším počtu. Je přece lepší jet se známými a kamarády společně. Vezmeme s sebou i toho, komu by se samotnému nechtělo.

Podívejte se na naše stránky a můžete se rovnou zaregistrovat.

Elektronická přihláška:

<http://esperanto.blahus.cz/cej/ali.gif>  
[o.php](http://esperanto.blahus.cz/cej/ali.gif)

Popřípadě můžete odpovědět na otázky, které se nacházejí vpravo, a zaslat na následující adresu:

Dagmar Chvátalová, Vysočanská 763, 582 91 Světlá nad Sázavou. E-mail: [chrosticek@seznam.cz](mailto:chrosticek@seznam.cz)

Pokud víte ve svém okolí o nějakých dalších mladých lidech se zájmem o esperanto, určitě jim tento dopis předejte, aby také měli možnost přihlásit se. Děkujeme.

Za ĈEJ Marek Blahuš, Tomáš Břicháček a Dáša Chvátalová.

*Přihlášku můžete vyplnit buď v češtině nebo v esperantu. Údaje, které je povinné vyplnit, jsou označeny hvězdičkou, nicméně velmi přivítáme, pokud vyplníte i zbývající. Umožníte nám tak udělat si lepší představu o členech našeho sdružení.*

## Česká esperantská mládež - Přihláška ke členství

Jméno a příjmení\*:

Adresa\*:

E-mail\*:

Datum narození\*:

Zaměstnání/student (čeho):

Zájmy: Zkušenosti s esperantem (cestování, komunikace, kurzy, semináře, IJK...)

Úroveň znalostí esperanta (žádné / začátečník / pokročilý / zkušený)\*:

Jak dlouho znáš/"děláš" esperanto:

Odkud znáš esperanto (sdělovací prostředky, známí, kamarádi atd.):

Proč a s jakým cílem se mu věnuješ? (čistě ze zájmu, cestování...)

S jakým cílem vstupuješ do ĈEJ (příznivec/ zájemce/ aktivní člen aj.)

Jsi členem některé esperantské organizace? (UEA, TEJO, ĈEA, IKUE aj.)

Máš zájem o účast na společných akcích? (vnitrostátní/ společné cesty do zahraničí/ oboje)

Uvažuješ o účasti na mládežnickém kongresu IJK v srpnu 2005 v Polsku? Máš zájem o dopisování s esperantisty ze zahraničí?

Potřebuješ s něčím pomoci?

Měl(a) bys zájem o pravidelné bezplatné internetové kurzy esperanta formou chatu v českém jazyce?

Chceš se na něco zeptat?

Poznámky a připomínky, návrhy k činnosti atd.

Datum vyplnění:

## Esperanto-renkontiĝo en Litomyšl



Sabate 23. 4. 2005 alveturis esperantistoj al Litomyšl por renkontiĝo. Krom la reprezentantoj de la klubo el Svitavy venis partoprenantoj el Prago, Žamberk, Lanškroun, Ústí nad Orlicí, Česká Třebová, Polička kaj Sebranice. La lokaj esperantistoj prizorgis trarigardon de la ceramika ateliero DUKE, kie Jiří Dudycha kun sia edzino prezentis produktadon de ceramikaj artaĵoj. Kelkaj personoj aĉetis belajn suvenirojn. Posttagmeze la programo sekvis en saloneto de la restoracio *U slunce* (Ĉe la suno). Fraŭlino Jonášová kun sia amiko rakontis pri vojaĝo tra Nov-Zelando. Ne mankis la tradicia tombolo.



## IKUE-konferenco

okazis en Česká Třebová (13.-15. 5. 2005). Kunvenis katolikaj esperantistoj el la tuta respubliko por elekti novan estraron de la sekcio kaj por priparoli agadon en la venontaj jaroj. Ĉijare estas planata Ekumena kongreso en Hungario kaj Katolika Esperanto-Tendaro en Sebranice.

Vendrede vespere prezentis siajn scenetojn kaj kantojn infanaj esperantistoj kun gitara akompano de pastro Patro Xavier el Písek. La propra traktado de la konferenco realiĝis dum la sabata antaŭtagmezo en Hory. Post la tagmanĝo la konferencanoj ĉeestis sanktan meson en kapelo kaj promenis en la ĉirkaŭaĵo de la urbo. Vespere oni amike interparolis kun J. Kalný kaj M. Šváček, kiuj partoprenis seminarion en Strasburgo kaj vizitis Eŭropan Parlamenton.

Dimanĉe ĉiuj adiaŭis kaj disiris.

## Gloraj esperantistoj

**Franz Jonas** (1899-1974) aŭstria ŝtatprezidento.

Lia patro Josef Jonáš el Kamenice apud Jihlava foriris en 1895 serĉi laboron al Vieno, kaj edziĝis tie kun Kateřina Rokosová el Pavlov apud Třešť. Ili havis ok infanojn, Franz estis la kvara. Esperanton li ekkonis en 1922 kaj iĝis sekretario de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista. Politikon li eniris en 1948 kiel urba konsilanto pri nutraĵ-problemo. En 1951 li estis elektita urbestro de Vieno kaj en 1965 ŝtatprezidento.

## Mia ceramik-farado

*Majka Píchová*

(la aŭtorino estas rulseĝulino)


Mi admiras argilon, ĉar ĝi estas mola, humida, fleksema. Ĝi lasas sin modli, knedi, premi, kurbigi, kunplekti, ruli, volvi. Ĝia avantaĝo estas, ke estante malmola, sufiĉas ĝin trempi kaj oni povas uzi ĝin denove. Por mi ĝi estas granda helpanto. Kiam mi suferis pro spasmoj, ĝi efikis malstreĉe. Kiam la geinfanoj de mia frato estis malgrandaj, oni ne volis, ke ili iradu en ceramikejon, ĉar ili tie "dekorus" la faritaĵojn per siaj fingretoj, aŭ ili falus en glazuron. De tempo al tempo Věrka al ili alportis argilon en kuirejon. Foje mi estis ĉe ili vizite kaj Věrka diris al mi: "Provu tion!" Mi la argilon nur premis, sed mi sentis kvazaŭ la argilo dirus: "Eble vi povos uzi min, post iu tempo."



M.T.

Antaŭ kvar jaroj, kiam mi diversmaniere korpekzercis, mia korpo al

mi sufloris, ke mi faru ion mane. Komence mi senŝeligadis cepon kaj ajlon. Poste mi en speciala ĵurnalo por handikapuloj vidis reklamon por ceramika kurso. Ĝi okazas en la domo Exodus en Třemošná apud Plzeň. Tiu domo havas senbarierajn loĝejojn, ceramikan kaj teksan laborejojn. La kurso daŭras unu semajnon. Aliĝinte, mi faris diversajn aĵojn, inter ili pladeton. Mi diros al vi, kiel mi ĝin pretigis.



M.T.

El argilo mi faras rulon volvitan kiel serpenton, tiun mi enmetas sur fundon de gipsa formujo kaj tie mi la rulon dispremas, por ke ĝi estu kiel volvaĵo videbla nek interne nek ekstere. Poste mi ringe volvitajn rulojn metas en du tavoloj super si, supren mi aldonas longan serpentorulon, kiu la pladeton firmigas. Ĉion mi dispremas tiel, ke interne estu pladeto glata kaj ekstere la ruloj estu videblaj. Fine per malseka spongo mi la pladeton interne elfrotas, por ke la ruloj estu kunligitaj. En la gipsa formo la produkto devas resti unu tagon.

Post ĝia elpreno oni devas ĝin ĉirkaŭe distranĉi. Kiam la pladeto estas malmola, oni metas ĝin en fornon unue - tiu procedo nomiĝas ardigo. Glaziira substanco estas diverskolora fajna sablo, kiun oni devas bone dismiksi en akvo. Ĝi devas aspekti kiel kremo kaj grasaĵo, por ke oni povu ĝin bone prilabori. Malbone dismiksitaj glazuro malsuprenfluas, malbone alteniĝas kaj post bakado ĝi estas senkolora. Se ĝi estus tro densa, ĝi malfacile tavoloĝus, formus makulojn kiel insuletojn, malbone kunfluas.

La pladeton mi glazuras tiel, ke mi donas ĝin sur malgrandan pentro-diskon, unue mi glazuras la internon, poste la eksteran surfacon. La diskon mi uzas, por ke mi povu turni la pladeton. Kiam ĝi estas per glazuro plene ŝmirita, mi donas ĝin en fornon tuj, ĉar la akvo en la freŝa glazuro sekiĝas rapide. La unua bakado okazas ĉe 800 °C kaj la posta ĉe 1500 °C.

Mi faras ankaŭ malgrandajn bildajn figurojn kun floretoj. Unue mi pretigas bulon, kiun mi bate platigas. Poste sur la plataĵon mi kunmetas nevolvitajn ruletojn, etajn buletojn kaj platetojn. Ili kune formas floretojn, kiujn mi sur la argilan bazon gluas. Kiel gluon mi uzas ŝlimon, ĝi estas argilo miksitaj kun akvo. En lokoj, kie mi gluos la

floretojn, mi skrapas la argilon per pikstangeto, unuopajn partojn de ĉiu floreto mi ŝmiras per ŝlimo kaj gluas. Fine mi per la stangeto trapikas truon por pendigo.




### Nova leĝpropono pri Esperanto en la itala Parlamento

La kampanjo de Eŭropa Esperanto-Unio, konata ankaŭ kiel "hungaraj rajtoj - eŭropaj rajtoj", celas doni al ĉiuj civitanoj de EU-landoj la rajton, kiun havas hungaraj civitanoj, lerni Esperanton kaj esti ekzamenata pri Esperanto fine de la mez-grada lernado. Ĝi celas kaj gvidlinion de la Eŭropa Parlamento kaj leĝojn en la unuopaj landoj de EU. En tiu kadro estis prezentita al la itala Parlamento la 10-an de marto leĝpropono, kiu nun ricevis la numeron 5714 kaj aperis en la presitaj parlamentaj dokumentoj. Ĝin prezentis la deputitoj BARBIERI, RANIELI kaj MEREU, kaj ĝia tuta titolo estas: "Normoj pri la aliro al la studo kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto". La ĉefa artikolo estas la unua, kiu asertas, ke "Inter la elekteblajn fremdajn lingvojn en la ŝtataj devigaj lernejoj oni enkondukas Esperanton." *rc*



## Pri Bretonio

Mia amikino Gabi, tre vigla esperant-istino pli ol 80 jarojn aĝa, multfoje invitadis min viziti Bretonion - parton de Francio. Kiam mi ne alveturis, ŝi petis helpon de Josette Ducloyaer, kiu zorgas pri E-prelegoj en Bretonio. Ankaŭ de ŝi mi estis invitita. Sed pri kio rakonti, kiam antaŭ mi jam prelegis pri nia lando dufoje Jiří Pištora kaj unufoje inĝ. Z. Polák? Do, mi decidiĝis rakonti laŭ deziro de ĉeestantoj aŭ pri vojaĝoj de mia infana E-grupeto eksterlanden dum naŭ jaroj aŭ pri naciaj kostumoj, kutimoj, instrui dancojn kaj ornami marcipanojn.



La 12-an de septembro 2004 mi ekveturis kun mia nepino Klárka, kiu devis de oktobro forveturi por viziti altlernejon. Mia parencino alveturis kun Anežka, knabino el mia E-grupeto. Dum kvin semajnoj ni loĝis en 17 lokoj, vizitis 20 E-klubojn, E-

kursojn, lernejojn kaj kunvenis kun multaj gesamideanoj. Ili interesiĝis pri mia rakonto, lernis de Klárka (poste de Anežka) kaj mi dancojn, rigardis bildojn kaj ankaŭ volis al ni montri ĉion la plej bonan de Bretonio.



Bretonio ĉarmis nin precipe per abundego de floroj. Ĉie floris diverskoloraj hortensioj, mi nenie vidis tiom da floroj. Domoj estas konstruitaj precipe el ŝtono kaj kovritaj de ardezo. En subĉiela muzeo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas kovraĵo el subtila kano. Homoj en ĉi tiu regiono antaŭe ne parolis france, sed bretone. Eĉ nun estas sur tabuloj kun nomoj de vilaĝoj kaj urboj dulingvaj surskriboj: france kaj bretone. Estas tie eĉ bretonaj lernejoj kaj homoj ŝatas bretonajn dancojn. Ĉiusabate ilin dancas en iu loko kaj ni ĉeestis lernadon de tiuj dancoj en vilaĝo St. Quay Perros, loĝloko de Gabi. Ili memorigas dancojn, kiujn mi vidis en Skotlando.



Bretonaj vilaĝetoj kun ŝtonaj preĝejoj en gotika aŭ romana stilo estis bele aranĝitaj. Ni admiris ankaŭ maron, rokojn ĉe ĝi kaj altan tajdon. Mia amikino Nikol volis al ni merkrede montri ĝin 15 km de Morlaix krom aliaj interesaĵoj. Monumentan viadukton en la urbo ni vidis, malnovajn domojn ankaŭ, sed al la maro ni alveturis malfrue. Asfalta ŝoseo al la insuleto jam estis sub la akvo kaj unu aŭtomobilo ankaŭ. Ĵaŭde ni alveturis ĝustatempe kaj iris al insuleto en malproksimeco de 1 km de la marbordo. Nikol diris, ke ni havas antaŭ tajdo sufiĉe da tempo. Sed post mallonga promeno ĉirkaŭ la insuleto ŝi ekkriis, ke tajdo jam alvenas, ke ni devas rapidi al marbordo. En unu loko jam akvo atingis niajn genuojn, niaj pantalonoj estis malsekaj, sed ni feliĉe atingis marbordon. Vespere ni kunvenis kun gesamideanoj kaj aŭdis, ke iam en tajdo estis buso kun anglaj turistinoj, kiujn savis unu esperantisto kun sia amiko helpe de floso.



Ĉe Gabi en St. Quay Perros ankaŭ kun ni kunvenis gesamideanoj, al kiuj ni rakontis. Alvenis eĉ redaktoroj el tri lokaj ĵurnaloj kaj skribis pri nia vizito. Du esperantistinoj montris al ni interesajn en proksimeco - *Rozkolorajn rokojn* kaj inter ili estintan kontrabandistan padon kaj malnovan doganejon.



Veturante de Gabi al nekonataj gesamideanoj al Lyré, ni kunvenis en la urbo Pontivy kun esperantista kantĥoro de Bretonio, kiu nomiĝas MEVEN kaj jam eldonis plurajn CD. Du kantistinoj en siaj aŭtoj veturigis nin poste al Augustin en Lyré. Tie ni rakontis al esperantistoj, poste al infanoj en lernejo de Oudon, kie Augustin montris al mi interesan turon kaj muzeon de poeto Joachim de Belay, poste en Lyré novan placon Esperanto kaj fine veturigis nin al la geedzoj Maryvonne kaj Bruno Robineau, kies libro „Ili vivis sur la Tero“ antaŭ nelonge aperis ĉehlingve („Osm let na cestách po naší planetě“,

tr. J. Drahotová). Kun nur dorsosakoj ili migris tra la mondo, en Bolivio ili adoptis knabeton Vincent, en Vjetnamio knabineton Sara. Mi renkontis ilin en 1995 en Gresillon, kiam la knabo estis trijara. La interparolo estis tre interesa ankaŭ por la loka gazetaro.



Merkrede ni veturis kun Augustin al Solange en St. Aignan. Survoje ni vizitis muzeon de vino (akompanis nin geamikoj Ménárd) kaj jam vespere en St. Aignan ni renkontiĝis kun la loĝantoj kaj prelegis. Ĵaŭde ni prelegis en du klasoj, por infanoj trijaraj ĉe Muriel kaj por dekdujaraj ĉe Gildas. Tagmeze trarigardo de klostro St. Philibert de Grand Lieu, post tagmanĝo pluraj tri klasoj kaj trarigardo de preĝejo. Dum sekvaj tagoj ni konatiĝis kun la urbo Nantes helpe de lokaj esperantistoj, al kiuj ni prelegis. Ili venigis nin al muzeo de Jules Verne. El Nantes forveturigis nin al Montoir de Bretagne geedzoj Cuenot, kiuj antaŭ kelkaj jaroj veturis en domveturilo tirata de ĉevalo.

Vintron 1998-1999 ili travivis en Ĉeĥio kaj geedziĝis en Fulnek. Ilia filo Romain estas nun trijara kaj filino Loly jam vizitas lernejon. Mallonge ni vidis esperantistojn en Vannes kaj Montoir de Bretagne. Poste Klárka devis reveni en lernejon, sed daŭrigis kun mi Anežka. Ni vizitadis plurajn urbojn, klubojn, lernejojn, inter ili naskan urbon de Chateaubriand (St. Malo). Nia gastigantino Anne-Marie promenis kun ni sur la insulo St. Michel kaj plenumis tiel mian revon. S-ano Gabriel fieris per ora medalo pro la plej bele ornamita domo per floroj, en St. Briec venis al nia prelego lacaj kursanoj, en Plouezec ni vidis ĉemaran rokon kun monumento de ĉeĥa aviadisto el Pardubice. En Daoulas nova prelego kaj trarigardo de Kalvario, statuoj de suferanta Jesuo. Nur pretere ni vidis la havenon Brest, sed ĉar jam estis mezo de oktobro, ni revenis tra Rennes kaj Parizo hejmen. En Bretonio, filino de oceanoj (laŭ F. Kožík), ni ĝuis amikecon de esperantistoj kaj prezentis multloke nian landon kaj nian urbon.

*Zdenka Novotná*



# **Pozvánka na 11. sjezd Českého esperantského svazu**

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (dále jen ČES) v souladu se stanovami svolává 11. sjezd ČES na dny **21. – 23. října 2005**.

Místem konání je **hotel DUKLA Vyškov**, Dědická 29, 682 02 Vyškov. Ubytování i stravování tamtéž.

## **Program:**

pátek 21.10. od 16 hodin prezence účastníků, ubytování

18.00 večeře

19.00 beseda s účastníky UK ve Vilniusu

sobota 22.10. 8.00 snídaně

9.00 zahájení sjezdu, přivítání účastníků zástupcem radnice a  
dětským pěveckým sborem

9.30 pracovní jednání

12.00 oběd

13.00 prohlídka města, pojmenování stezky „Esperanto“, návštěva  
výstavy esperantských knih v Knihovně K. Dvořáčka

15.30 pokračování pracovního jednání, diskuze, volby

18.00-19.00 večeře

19.00-23.00 zábavný večer s tombolou

neděle 23.10. 8.00 snídaně

9.00 pracovní jednání

11.00 ukončení sjezdu

## **Účastnický poplatek:**

člen ČES - při platbě do 1.10. 2005 - 200 Kč, po tomto termínu 300 Kč

(členem ČES se zde rozumí člen v kategorii F - doživotní, nebo členové v kategoriích A, B, C, D a Z - za předpokladu, že mají uhrazeny členské příspěvky na rok 2005 nejpozději v den zahájení sjezdu)

nečlen ČES - při platbě do 1.10. 2005 - 300 Kč, po tomto termínu 400 Kč

Do 1.10.2005 mládež do 30 let a nevidomí členové ČES neplatí účastnický poplatek.

Čestní členové ČES a čestní hosté bez poplatku

**Strava + ubytování** - začíná páteční večeří a končí nedělní snídaní.

Diety či vegetariánská strava možná (prosíme uvést na přihlášce).

Cena (ubytování a stravování) jednotná - celkem 750,- Kč – vše pod jednou střechou, jednání v sále hotelu. Ubytování je ve dvoulůžkových pokojích (s možností přistýlky) s vlastním sociálním zařízením. Televize na pokoji.

**Popis cesty k místu konání sjezdu:**

Účastníci, kteří přijedou vlakem nebo autobusem, pojedou Městskou autobusovou dopravou směr poliklinika – výstup na zastávce Rostex (z autobusového nádraží je to 4. zastávka, 2. zastávka je vlakové nádraží).

V pátek jsou odjezdy z autobusového nádraží v 12:20, 13:20, 14:10, 14:40, 15:40, 16:10, 17:10, 18:10 a 19:10. Pěšky trvá cesta asi 20 minut. Z autobusového nádraží jděte směrem k vlakovému, dále ulicí II. odboje, na křižovatce zahnete vlevo do ulice 9. května. Za železničním viaduktem se ulice již jmenuje Dědická. Délka cesty je asi 2 km.

Cesta autem: při příjezdu do Vyškova ze směru Olomouc, Zlín, Prostějov při hlavním průjezdu městem na světelné křižovatce vpravo na směr Dědice, při příjezdu od Brna, Blanska na 3. svět. křižovatce vlevo směr Dědice.

Během sjezdu budete mít možnost zakoupit esperantské zboží v Libroservu ČES. Libroservo bude na sjezdu výhradním prodejcem, pokud si přejete nabídnout k prodeji svoje E-předměty, pak pouze jeho prostřednictvím. Neesperantské zboží nebude dovoleno prodávat. Vkládání reklamních materiálů do tašek pro účastníky a jakákoliv další propagační činnost jsou možné po předchozí dohodě s ing. Dvořákovou.

Taktéž budete moci na místě zaplatit členské příspěvky ČES, UEA a předplatné esperantských časopisů.

**Úhrada účastnického poplatku je možná těmito způsoby:**

a) složením příslušné sumy v kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a na většině pošt, kde je přepážka Poštovní spořitelny na konto ČES č. účtu **195 230 825 / 0300**, konstantní symbol **0379**. K zaplacení použijte výhradně tiskopis VKLAD, kde se neuvádí jméno plátce a tak nejdůležitějším údajem je variabilní symbol, který je desetimístný. Prvních pět číslic je Vaše číslo členské legitimace (např. 09824 nebo 00576) a dalších pět číslic je kód sjezdu **10011**.

**Úhrada je bez poplatku.**

b) bezhotovostním převodem z Vašeho bankovního účtu. Konstantní symbol je **0308**, variabilní symbol je stejný jako při hotovostní platbě na poště.

**Přihlášky** posílejte pokud možno **do 1. října 2005** (rozhoduje datum poštovního razítka) na adresu **Český esperantský svaz, c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady**.


Stornovací poplatky: při odhlášení do 15. října 2005 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10% ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 20%.

Těšíme se na shledanou ve Vyškově.

Věra Podhradská, v.r.  
předsedkyně ČES



## Plánek cesty k hotelu Dukla



Velkou atrakcí Vyškova je Aquapark, krytý bazén se spoustou skluzavek [http://www.frajt.cz/refer/a\\_vysk.htm](http://www.frajt.cz/refer/a_vysk.htm), <http://www.vyskov-mesto.cz/soucasnost.asp>

## KATOLIKA E-TENDARO

de Internacia Katolika Unuiĝo  
Esperantista (IKUE)

okazos de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto  
2005 en Ĉeĥio

La aliĝilon sendu al: IKUE-Katolika  
Sekcio de ĈEA, s-ro Miloslav Švaček,  
Tršická 6, CZ-75127 Penčice, Ĉeĥio, aŭ  
retpoŝte: [m.svacek@seznam.cz](mailto:m.svacek@seznam.cz)

## SOMERA E-TENDARO

en Lančov havas novan retejon <http://www.set-lancov.cz/> kun pri-skribo de la tendaro, fotogalerio kaj aliĝilo por la tri etapoj (3. 7. /16.7. - 17.7./30.7. - 31.7./13.8.), kiun oni povas sendi al la nova reta adreso [esperanto.trebic@volny.cz](mailto:esperanto.trebic@volny.cz) aŭ per klasika poŝto al Esperanto Třebíč, Esperantistů 3, 674 01 TŘEBÍČ.



En la tendaro okazis labor-brigadoj por renovigi necesejojn kaj lavejojn. Al la renovigoj kontribuis donacoj por la Fondaĵo Lančov (**GE Capital Bank a.s. 6401502-754/0600, variabilní symbol 115, konstantní symbol 0308**).

La 13-an de aŭgusto 2005 jam tradicie renkontiĝos en la tendaro malnovaj tendaranoj, kiuj vizitadis la tendaron en sia junaĝo kaj volas nun rememori malnovajn amikojn kaj pasintajn tempojn. La kultura programo kulminas per tendarfajro.



# 100 jaroj de Esperanto-klubo en Pilzeno

1905 - 2005

Esperanto-klubo en Pilzeno estas jam tria en Ĉeĥio, kiu festis centjaran jubileon. Ĉe tiu ĉi okazo aranĝis Pilzenaj esperantistoj solenan renkontiĝon, kiu okazis la 20-an kaj 21-an de majo 2005. Tiun ĉi aranĝon partoprenis 60 esperantistoj el pli ol 20 lokoj, inter ili ankaŭ el Germanio.

La solenaĵo okazis en salono de Pilzena bierfabrikejo. Vendrede vespere la ĉeestintoj aŭskultis kelkajn raportojn el diversaj lokoj. Inter ili estis ankaŭ informoj pri ĈEA-agado, Petro Chrdle aldonis lumbildojn pri komitata laboro kaj parolis pri UEA, pri eldonado de Esperanto-libroj, disponigis novajn eldonaĵojn kaj informis pri E-aranĝoj, kiu nin atendas. Fermon de tiu ĉi vespero prizorgis Pavla Dvořáková el Písek, kiu preparis kantadon en Esperanto, akompanate de gitaro.

Sabate antaŭtagmeze ni trarigardis Esperanto-ekspozicion, kiu troviĝas ĝis la 27-a de majo en la Scienca biblioteko, do en centro de la urbo, kie la preterirantoj povas ĝin viziti. Ĝojigas, ke ĝi estis preparita ankaŭ helpe de eksterpilzenaj samideanoj dank' al interkluba kunlaboro. Trarigardon de ĉefaj memoraĵoj sekvis posttagmeze solenaj paroladoj. La ĉeestintoj prezentis salutvortojn, gra-

